

August Heinrich Hoffmann,  
 Sopiro je l' printempo  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kiom estas fariĝinte  
 Triste kaj malvarme nun!  
 Krude ventas, sin kaŝinte  
 Jam ne brilas plu la sun'.

Verdajn montojn surfluginte  
 Valojn volus vidi mi,  
 Sur herbejo ekkuŝinte  
 ĝozi pri la sunradi';

Volus aŭdi mi sonadon  
 Sonorilan de bovar',  
 Ŝalmojn kaj la birdkantadon  
 Sur kampar' kaj en arbar'.

Ho, printempo, vi revenu,  
 Bela, kara primaver',  
 Nin per floroj, kantoj benu,  
 Reornamu sin la ter'!

Restos vi al ni fidela,  
 Portos ĝojon vi al ni,  
 Venos vi majeste bela,  
 Verdigante ĉion ĉi.<sup>3</sup>

<sup>4</sup>

August Heinrich Hoffmann,  
 Sehnsucht nach dem Frühling

O wie ist es kalt geworden  
 Und so traurig, öd und leer!  
 Rauhe Winde wehn von Norden  
 Und die Sonne scheint nicht mehr.

Auf die Berge möcht ich fliegen,  
 Möchte sehn ein grünes Tal,  
 Möcht in Gras und Blumen liegen,  
 Und mich freun am Sonnenstrahl;

Möchte hören die Schalmeien  
 Und der Herden Glockenklang,  
 Möcht freuen mich im Freien  
 An der Vögel süßem Sang.

Schöner Frühling, komm doch wieder,  
 Lieber Frühling, komm doch bald,  
 Bring uns Blumen, Laub und Lieder,  
 Schmücke wieder Feld und Wald!

Ja, du bist uns treu geblieben,  
 Kommst nun bald in Pracht und Glanz,  
 Bringst nun bald all deinen Lieben  
 Sang und Freude, Spiel und Tanz.

...

---

<sup>3</sup>Tiu lasta linio estas iom libera aldono de la tradukinto. Ĝi ne kongruas kun la enhavo de la kvara strofo, sed eble kun la enhavo de la tuta poemo.

<sup>4</sup>Jen laŭvorta esperantigo de la kvina strofo:

*Traduko de la Germana poemo “Sehnsucht nach dem Frühling” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1997-02-01.*

MR-291-2 / Arg-774-1552 (2013-01-17 15:50:13)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19).*

Arg-774-1551 (2013-04-04 22:16:11)

*La muziknotoj de la melodio troviĝas en [http://www.lieder-archiv.de/o\\_wie\\_i\\_t\\_es\\_kalt\\_geworden-notenblatt\\_100117.html](http://www.lieder-archiv.de/o_wie_i_t_es_kalt_geworden-notenblatt_100117.html). La melodio estas audebla en [http://www.youtube.com/watch?v=Amol\\_05KJCA](http://www.youtube.com/watch?v=Amol_05KJCA) kaj en <http://ingeb.org/Lieder/owieiste.html>.*

---

Jes, vi estas restinta al ni fidela,  
Vi venos nun baldaŭ en pompo kaj belo,  
Vi alportos nun baldaŭ al ĉiuj viaj karuloj  
Kanton kaj ĝojon, muzikadon kaj dancon.

<http://www.poezio.net/version?poem-id=774&version-id=,1552,1551>